



**juna
amiko**

Jubilea numero
kun verkoj
de niaj
junaj legantoj



INTERNACIA ESPERANTO-REVUO DE
POR LERNEJANOJ KAJ KOMENCANTOJ

MARTO 2002

ILEA
1 (100)



Euroscola-Tago 2001




Sur la kovril' paĝoj: pentraĵoj de serbaj knaboj, Marko Cvetković kaj Marko Bunuševou

Jen estas la jubilea n-ro 100! La unua tri-cifera n-ro!

Kun granda ĝojo mi raportas, ke tiu ĉi numero estas ne ordinara. Por la festa okazo ni jetis en la angulon la tradiciajn rubrikojn. Ni kuraĝe decidis redakti ĝin kun la leg'antoj!

dispon'igos paĝojn por interesaj kontribu'ajoj. Sendu ilin ankaŭ en la estont'eco!!!



Mi tut'kore dankas al ĉiuj ge'knaboj, plenaĝaj amikoj, kiuj sendis siajn interesajn verketojn por Juna Amiko kaj esperas, ke tiu kutimo restos ĉe pluraj.

Ni volonte dispon'igos

Kaj se via verko ne povis en-iri la nunan numeron, konsolu vin la promeso, ke pluraj verketoj aperos en postaj numeroj.

Dank' al Esperanto ni havis ebl'econ partopreni

Kroatio. Zagrebo. Centro de la urbo, eta ejo plen'plena je libroj, gazetoj. Lokoj apenaŭ por sidi. En tiu ĉamb'r'eto kolekt'igis grupo de entuziasmaj¹ esperantistoj kun la komuna celo vojaĝi Francion por partopreni en la Euroscola-Tago 2001.

Kompren'eble, nenio estas sen problemoj. Ĉi-foje ni bezonis iom da mon'helpo. Feliĉe, ni trovis sponzorojn² ŝtatajn kaj privatajn (eĉ bombonoj kaj frukto-sukoj ne mankis!). Sub bona organizo de nia gvid'ant'ino Marija Beloŝević ni ek-veturis buse la 6-an de majo. Tiu vojaĝo ebl'igis al ni ekkoni niajn sam'aĝ'ul'inojn el aliaj urboj.

Strasbourg kaptis nin

Post 23-hora vojaĝo, tuj post la en-loĝ'igo ni grupe for-iris al la urbo-centro.

Stratoj, stratetoj, homoj, pont'etoj, kanaloj, melodia parol'ado, nova maniero trakti ĉirkaŭ-aĵon. Kombino³ de moderna kaj belega mez'epoka stilo. Katedralo⁴: milo da detaloj ellabor'itaj ĝis perfekt-eco, ni restis sen vortoj pri-skribi la bel'econ.

Re-ven'inte al la loĝ'ejo, ni trovis niajn italajn kun-loĝ'antojn. Kune ni organizis ital-kroatan vesperon, dum kiu ni fiere montris la dona-

cojn de niaj sponzoroj, sed ni fieris ankaŭ pri la kukoj de niaj patri-
inoj, avinoj. La vespero pasis en ege amika kaj gaja etoso⁵.

En la koro de Eŭropo

Al-venis la tago, pri kiu ni tiom revis. Kaj fine, ni trovis nin antaŭ la grandega parlamenta⁶ konstru'aĵo. Post la en-iro tra sekur'pordoj, ĉe maten'manĝo, ni havis eblecon ekkoni esperantistojn el Rumanio, Svedio, Hungario, Litovio kaj Francio.

Esperanto montr'igis taŭga ŝlos'ilo

Ĉirkaŭ 200 junaj esperantistoj sen-probleme inter-kompren'igis. Tio estas vere ne-priskrib'ebla sento por homo, kiu la unuan fojon partoprenas tian aranĝon. En la granda salon'ego⁷, oni okaz'igis ve-
ran "parlamentan" kun-sidon, en kiu ankaŭ ni, esperantistoj plen-
rajte partoprenis. Mi ne povas priskribi, kia sento ek-regis nin, kiam
ni sidis en EU⁸-benkoj, plenrajte voĉ'donis tie kaj ek-sentis, kion
post kelkaj jaroj esper'eble spertos niaj politik'istoj. Kiu scias: eble
iu el ni tiam re-sidos tie!

Konkurso pri EU

Dum la paŭzo ni ĉiuj partoprenis "Eurogame". Temas pri kvizo kun bazaj informoj pri EU. En nia Esperanto-grupo gajnis kvaropo, kiun konsist'igis geamikoj el Francio, Hungario, Kroatio kaj Rumanio.

Ĝis revido en iu angulo de Esperantio

La lastan tagon akceptis nin la kroata ambasadoro¹⁰ ĉe la Konsilio de Eŭropo.

Post promeno tra Stasbourg, venis la horo, kiam ni devis adiaŭi la sun'plenan urbon. Krom ĉiuj tra-viv'aĵoj, plej bela memor'aĵo restis korespond'ado kun novaj geamikoj.

Pri tiu ĉi vojaĝo ni memoras kun nostalgio¹¹ kaj la espero denove partopreni iun Esperanto-aranĝon!

Svijetlana AKIK, Kroatio

1. fari ion kun arda emo / 2. help'antojn per mono / 3. plaĉa kun-ig'ado de elementoj /
4. ĉefpreĝ'ejo / 5. anim'stato, humoro de la ĉeest'antoj / 6. parlamento: reprezent-
ant'aro de la ŝtat'anoj / 7. ĉamb'ego / 8. Eŭropa Unio / 9. efikis sur la koro, spirito /
10. reprezent'anto de ŝtato en alia ŝtato / 11. mal-gaŝ'eco kaŭz'ita de deziro re-vidi ion
ne-atling'ebian.



VIA VOĈO



Por havi vian opinion pri nia revuo, por doni al vi eblon el-diri kritikon, dezirojn, proponojn, ni mal-fermas novan rubrikon:

VOĈO DE LEGANTO

Ni petas vin helpi nian redaktan laboron per viaj sinceraj konsiloj kaj proponoj. La plej bonaj el ili aperos en la revuo kaj ni povos diskuti pri ili kiel, ekzemple, pri la tre afabla suba rimarko el Brazilo:

“De kelkaj jaroj mi konas nun ĉi revuon, kies rubrikoj ĉiam alportas klaran kaj alt-nivelan Esperanton. Ĝi ebl'igis al mi krom perfekt'igi ankaŭ kler'igi kaj distr'igi, solvi diversajn lingvajn dubojn, kiujn ĉiuj komenc'antoj kaj eĉ spertaj esperanto-parol'antoj havas dum la uz'ado de nia internacia help'lingvo.

Nun mi sentas la devon kaj danki kaj gratuli ĉiujn el-don'intojn, redaktorojn kaj kun-labor'intojn de la 100 unuaj numeroj de Juna Amiko kaj, sam'tempe, mi kaptas la oportunaĵon stimuli kaj deziri sukceson al ĉiuj konstru'ontoj de la ven'ontaj 100 numeroj.

Juna Amiko jam okupis sian lokon en Esperantio kaj posed'prenis la koron de ĉiuj, kiuj obstine sub'tenas la verdan standardon.

Fier'plene kaj solidar'eme, via leg'ant/int'onto:

Jader Rodrigues Da Silva el Belo Horizonte, Brazilo”

Nia adreso: Juna Amiko, Hítel u.10.fsz.16, H-6000 Kecskemét, Hungario.

Ret'adreso: suli267@szeged.sulinet.hu

INFORMU NIN PRI VIA OPINIO!

INTERNACIA
PEDAGOGIA **REVUO**

ilei

IPR prezentas la laboron de
Por ricevi prov'ekzempleron, skribu al la redaktoro:

Jozefo Németh, Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario

Retadreso: Jozefo@nl-papa.hu

Hejm'paĝo: www.nl-papa.hu/ipr

Jen tri tekstoj de brazilaj infanoj

Dolĉ'ajo Patrin'

*Ingrediencoj*¹:

250 g da emocio²; 1 kg da amo kaj kareso³ por la tuta vivo; 450 g da eduk'ado; 300 g da zorg'emo kaj mal-dorm'eco; 0,5 kg da pasio⁴; 1 litro da larmoj verŝ'itaj pro ge-filaj sufero kaj ĝojo; 100 g da fermento⁵ el paco por eduki siajn gefilojn por pli bona mondo; 4 tasoj da bona humoro kaj feliĉo malgraŭ ŝiaj okupoj; 1 pinĉ'preno⁶

da sever'eco laŭ-guste ĉiu-foje, kiam ĝi necesas, por ke la gefiloj re-iru al ĝusta konduto; 1 kg da harmonio⁷ por igi la hejmon feliĉa.

Prepar'maniero:

Tre bone miksu ĉion, por ke la miksaĵo kun-iĝu. Metu ĝin en la form'ujon de ŝia koro. Tenu ĝin longe en la forno de ŝia plej pura amo kaj sin-dono.

Preĝo al la patrinoj

Sankta Virg'ulino⁸, patrino de ni ĉiuj. En tiu ĉi tago, aparte speciala, ni humile⁹ petas vin gardi kaj protekti ĉiujn patrinojn de l' mondo.



Per via sankta mantelo kovru niajn patrinojn, don'ante al ili sanon, amon, pacon kaj esperon, por ke la gefiloj, sekv'antaj iliajn

ekzemplojn, fariĝu bon'uloj, labor'antoj indaj al ilia amo.


Sankta Virgolino, konsolo por ĉiuj aflikt'uloj¹⁰, ni petas vin ne forgesi la patrinetojn, kiuj jam forpasis kaj nun estas ĉe vi, zorg'antaj siajn gefilojn, kiuj restis ĉi tie plor'antaj pro ilia for-esto.

Sankta Patrino, gardu ĉiujn patrinojn, kiuj kor'dolore vidis siajn gefilojn forpasi al Dio aŭ perdi ĝi en mis-vojoj de l' mondo.

Sankta sinjorino, ni dankas vin pro via grandega amo kaj petas forton, por ke ĉiuj patrinoj povu superi siajn suferojn kaj mal-facil'ajojn, kiujn la vivo povos al-porti al ili. Amen¹¹!

Esti patrin'...

signifas ne nur naski infanon el sia ventro;
signifas ankaŭ esti komprenema, amik'ema, kun-ul'ino por paŝi kun ni dum la tuta vivo;
signifas rid'eti eĉ kiam ŝi malĝojas.



Patrino estas
la plej sincera am'esprimo;
la plej valora riĉ'aĵo de nia vivo;
speciala est'ulo;
dis-don'anto de amo;
la persono, kiu ne timas batali;
tiu, kiu ĉiam pretas helpi;
mia viv'kialo.
Esti patrin', ja, ne facilas!
Kio okazus al mi sen vi?
Patrino estas kiel bela kanto.
Kien ajn mi iros, mi ĉiam kunportos ŝian nomon.

Tekstoj grupe far'itaj de 11-jar'aĝaj ge-lernantoj de la 5-a klaso de ŝtata publika lernejo *Almirante Rodrigues Silva*,
Urbo: Valença, Ŝtato: Rio de Janiero, Brazilo
Instruistino: *Geruza Alves Nogueira*
Tradukis Esperanten: *Evandro de Freitas*

1. konsist'igaj elementoj / 2. kor'tuŝo / 3. am'plena man'tuŝo / 4. fort'ega emocio / 5. rapid-ig'ilo de kemiaj ŝanĝoj / 6. kvanto pren'ebila inter du fingro-pintoj / 7. bona akordo inter personoj / 8. Sankta Maria / 9. mal-fiere / 10. afflikti: kaŭzi kor'doloron / 11. Estu tiel!; fina vorto de krist'anaj preĝoj.

Niaj instruistoj diris...

- Tiu ĉi matematika tasko estas ne-solv'ebila. Fin'solvu ĝin hejme!
- En la skriba hejm'tasko pri-skribu iun homon. Mi ne pensas pri iu scienc'isto aŭ profesoro, sed pri tute normala homo.
- La plej ofta frazo de la lernantoj estas: "Mi ne scias".
- Skribu nur tion, kion mi diris al vi, kaj ne iujn aliajn sen-senc'ajojn!
- Kiu nenion scias, almenaŭ ripetu tion.
- Se vi estas tiel stulta, ke vi nenion memoras, notu ĉion skribe. Tion ankaŭ mi faras.

Kolektis: *Dieter BERNDT*, Germanio

Vizito en orf'ejo¹

En aŭgusto 2000, ni havis grandan ĝojon akcepti niajn francajn ge-amikojn, la tre afablan familion *Robineau*, *Maryvonne* kaj *Bruno* kun siaj adopt'itaj² ge-filoj *Vincent* kaj *Sarah*. Sam'tempe vizitis nin ankaŭ nia juna korespond'anto *Erwin Kretz* el Colmar.

Ni kune vizitis kelkajn belajn lokojn de nia urbo, la ban'ejojn, ekzemple, kaj ankaŭ nian Esperanto-klubon, kie niaj gastoj parolis al ni pri sia Esperanto-aktiv'ado kaj pri siaj vojaĝoj pere de la Internacia Lingvo.

La sekvan tagon ni kune vizitis la orfejon, konstru'itan antaŭ ne-longe por sen-hejmaj infanoj. Ĝi troviĝas en vilaĝo Tamășeu, ĉirkaŭ 22 kilometrojn for de nia urbo Oradea.

En tiu orfejo mia patrino, *Irina Nagy* (nia kun-labor'anto, red.) pentras grand'egan bildon sur la ekstera muro de la orfejo. Dum la paŭzoj³ ni kune instruis Esperanton al la orfoj kaj ilia eduk'ist'ino.

Tutage, kiam ni vizitis la orfejon kune kun niaj francaj gastoj, la geknaboj kun ilia edukistino plej kor'varme kaj entuziasme akceptis nin. Ili montris al niaj gastoj ĉiujn lokojn de la orfejo kaj poste ili kantis al ni belegajn kantojn. Niaj gastoj estis tre korus'itaj pro la varma akcepto fare de la orfoj kaj antaŭ la adiaŭo la familio *Robineau* faris kelkajn fotojn memore al tiu ne-forges'ebla agrabla evento⁴. Supre, vi vidas unu el ili.



12-jara Alberto NAGY, Rumanio

1. orfo: infano sen gepatroj / 2. adopti: preni al si kiel fil(in)on / 3. paŭzo: mallonga ripoz'tempo / 4. okaz'ajo.

En oktobro de la pas'inta jaro mi ricevis leteron el Oradeo, Rumanio. Mi citas¹ el ĝi nur kelkajn vortojn, aŭskultu ilin:

“Mia nomo estas Dani Henț [Henc] kaj mi havas 13 jarojn. Mi eklernis Esperanton, antaŭ ĉirkaŭ unu jaro, de mia plej bona amiko Alberto Nagy [Nadʒ] (vidu lian verkon apude). Mi estas tre feliĉa, ĉar pere de tiu ĉi lingvo mi sukcesis trovi plurajn leter'amikojn el diversaj landoj...”

Jen lia kontribu'ajo:

Aferoj inter-dependas

Indianan trib'estron² mult'ege ĉagrenis la pigr'eco³ de lia popolo, tio, ke dum tutaj tagoj ĝi faras nenion.

Iun tagon li ordonis al la viroj iri en la arbaron por haki arbojn, mensog'ante, ke la meteologoj⁴ antaŭ-vidas tre mal-varman vintron.

La indianoj — tim'ante, ke ili restos sen sufiĉe da hejt'ajo dum tia terura vintro — fervore laboris. Ili for-hakis multege da arboj kaj portis ilin hejmen per ĉaroj. La tribestro estis ege kontenta pri la bona rezulto, kiun li sukcesis atingi pere de ruz'ajo.

Poste, iun tagon, pro sci'vol-emo la tribestro telefonis al la meteologo por demandi, kia, fakte, estos la vintro ĉi-jare.

La meteologo diris decide, ke tiu ĉi vintro tut'certe estos ege

malvarma, ĉar li vidis indianojn kun granda fervoro trans'port'adi forhak'itajn arbojn por havi sufi-ĉan brullignon.



Teksto kaj bildo de
Dani Henț, Rumanio

1. re-diri, re-skribi laŭ-vorte / 2. tribo: sam'de-ven'an'aro / 3. mallabor'emo / 4. veter'isto.

Ni lanĉas novan rubrikon, kiu ĉiu-foje prezentos eminentan artiston de iu malgranda nacio, kiu plej ofte – pro lingva izolo – ne havas la merit'indan tut'mondan kon'at'econ.

GENI'ULO DE ISLAND'ANOJ

Halldór Laxness

En la somero 1919, islanda 17-jara junulo komencis sian unuan vojaĝon al eksterlando. Tiam jam estis en la pres'ejo lia unua romano, kiun li finis en la antaŭa aŭtuno. Pri tiu libro, titol'ita *Infano de l'naturu*, unu recenz'isto¹ esprimis la opinion, ke ne surprizus² lin, se la juna aŭtoro iam fariĝos favor'ata filo de la islanda popolo. 36 jarojn poste (1955) *Halldór Laxness* [Haldour Laŝnes], tiam verk'into de multaj mond'famaj romanoj, akiris la plej altan re-konon, kiun verkisto povas akiri, la Nobel-premion.



Halldór Laxness nask'iĝis en islanda kamp'aro, proksima al la ĉefurbo Reykjavik, kiu tiam (1902) havis nur 6000 en-loĝ'antojn (nun pli ol 100.000). Li komencis verki rakontojn jam kiel juna knabo, legis avide kaj intime³ konat'iĝis kun la riĉa hered'aĵo⁴ de la malnova islanda literaturo, la Sagaoj, kiuj multe influis⁵ la objektivan⁶ stilon de liaj postaj verkoj. Li komencis studi en la gimnazio⁷ en Reykjavik, sed ne havis paciencon fini tie siajn studojn, lia deziro direkt'iĝis al la granda mondo trans la maro, nenio povis lin halt'igi. En Kopenhago li eksperimentis⁸ per verk'ado de noveloj en la dana lingvo, kiuj aperis en ĵurnaloj. Sed tre baldaŭ li firme decidis verki en sia gepatra lingvo, la islanda, kaj tiel faris ĉiam poste. Kaj venis la tempo, ke liaj libroj komencis esti traduk'ataj en aliajn lingvojn. Dum lia vivo tradukoj de multaj liaj romanoj aperis en pli ol 40 lingvoj.

Post ne-longa rest'ado en Danujo, nia juna verk'isto ek-iris suden kaj restis, dum kelka tempo, en benedikt'ana⁹ monaĥ'ejo¹⁰ en Luksenburgo, kie li ricevis eduk'adon pri la franca kaj latina lingvoj kaj konvert'iĝis¹¹ al katolik'ismo¹², kiun li, cetere, for-lasis dum sia posta long'daŭra ag'ado kiel socialisto. Dum sia katolikisma periodo¹³ li verkis la romanon *La granda teks'isto el Kaŝmiro*, kiu markis komencon de nova epoko en la historio de la islanda literaturo. La romano estas grand'parte aŭtobiografia¹⁴, la stilo estas flue elokventa¹⁵ kaj multe influ'ita de la tiu-tempa superrealismo¹⁶.

Halldór Laxness estis mond'vojaĝ'anto en la vera senco de la vorto. Ĉie li kolektis spertojn kaj konojn, kiujn li poste util'igis en multaj siaj verkoj. Tamen kvar el liaj grandaj romanoj estas tiel esence island'ecaj, ke ili far-

iĝis simboloj de certaj gravaj aspektoj de la islanda popol'animo. La romano *Sen-de-pendaj homoj* temas pri islanda farm'isto kaj la vivo de lia familio en ege malfacilaj cirkonstancoj dum la du unuaj jar'dekoj de la 20-a jarcento. Kio karakterizas tiun farmiston estas lia obseda, ne-venk'eblo volo esti sendependa, neniam akcepti helpon de aliaj, vivi absolute mem-stara.

La romano *Salka Valka* pri-traktas la vivon en islanda fiŝ'ista vilaĝo, la ĉefa persono estas juna virino de firma karaktero, kiu fariĝas gvid'anto de labor'ista societo, kiu batalas kontraŭ la sur-loka kapital'ismo.

La tri-voluma verko *Sonor'ilo de Islando* estas baz'ita sur historiaj fontoj el la frua 18-a jarcento, kiam island'anoj estis sub la aŭtokrata¹⁷ reg'ado de la dana reĝo. La *Sonorilo* estas simbolo de la spirita memstar'eco de la islanda popolo en tiu tempo.

La kvar-voluma romano *Lumo de la mondo* pritraktas la sorton de pro-



Halldór Laxness

Malbona korniko en la turo

Rakonto por infanoj

En la preĝ'eja turo en Hispanio estas terure malbela korniko. Iam al-venis malbona rab'isto kun nigra barbo kaj volis fari ion ne-permes'itan.

Tiam venis la korniko, ek-sidis sur lia ĉapelo kaj diris:

“Fi, fi, malbona rabisto, mi el-pikos al vi la okulojn, se vi ne ir'aĉos sur la monton, kie vi loĝas kun ĉiuj tiuj malbonaj homoj.”

Kaj tiam la rabisto ek-timis, ĉar kvankam li estis malbona, tamen li ne volis fariĝi blinda. Kaj li re-iris al ĉiuj tiuj malbonaj homoj kaj diris:

“Estas terure malbela korniko en la turo.”

Kaj la kompat'inda malbela korniko kantis per sia rusta¹ trakeo² dum la tuta tago, ĉar ĝi estis tiom ĝoja. Kaj la kompat'inda korniko povos ĉiam loĝi en la turo.

leta poeto, kiu sam'tempe estas simbola modelo de ĉiuj sen-havaj poetoj en Islando tra jarcentoj.

Tiaj estas la grandaj romanoj de Halldór Laxness. Ili ĉiam pritraktas gravajn temojn, kiuj koncernas ne nur islandajn cirkonstancojn, sed ankaŭ komune homajn. Neniel estas eble pritrakti lian verk'aron krom sup'aje en mallonga artikolo. Liaj libroj nombras plii ol kvindek, krom mult'egaj eseoj kaj artikoloj de la plej diversaj temoj. Li mortis en 1998, 96-jara. Du jarojn poste liaj islandaj legantoj elektis lian romanon *Sendependaj homoj* la Libro de la Jarcento. Li estas konsider'ata la plej granda islanda verkisto post la nekonataj aŭtoroj de la Sagaoj de la 13-a jarcento.

Baldur RAGNARSSON

1. tro-uz'ita kiel fero sub-ĉiela / 2. spir'tubo al la pulmoj.

Okaze de la jubilea numero, ni varm'kore re-memoras pri la plej fidela kun-labor'into de nia revuo en la 70-aj jaroj, pri la de-longe for-pas'inta latva poet'ino de la Esperanta literaturo, *Ludmila Jev-sejeva*. Ŝi sendis la suban ĉarman anekdoton antaŭ pli ol 20 jaroj. Ĝis nun ĝi ne aperis, kuŝis ne-tuŝ'ita en mia tir'kesto

LAKON'ECO¹ DE LA SPART'ANOJ



La loĝ'antoj de Sparto² disting-iĝis per sia tre konciza³ parol-maniero.

Kiam la macedona⁴ reĝo Filipo al-proksim'iĝis, kune kun sia grandega armeo, al la muroj de la urbo Sparto, li sendis jenan sciigon al la spart'anoj:

“Kiel vi deziras min vidi: ĉu kiel amikon? Ĉu kiel malamikon?”

La spartanoj respondis: “Neniel.”

La furioz'iĝ'inta⁵ reĝo sendis ti-am al la spartanoj duan averton:

“Se mi en-iros vian urbon, mi eĉ unu ŝtonon ne rest'iĝos en ĝi kaj neniigos vin ĉiujn.”

La spartanoj respondis nur per unu vorto:

“Se.”

1. vort'avar'eco / 2. pra-tempa greka urbo-ŝtato / 3. mallonga sen super'flujaj detaloj / 4. Macedonio: pra-tempa lando en Balkanio / 5. furioza: sen-lime kolera.

1. kritika raport'isto pri verko / 2. trafus rapide kaj ne-atend'ite / 3. tre bone, detale / 4. heredi: posed'preni de antaŭulo / 5. efikus sur iun / 6. sen-emocian / 7. speco de mez'grada lernejo / 8. faris seriozajn provojn / 9. aparten'anta al unu el la ordenoj religiaj / 10. domo por pastroj / 11. al-preni al si novan religion / 12. instru'aro pri la religio kun papo kiel ĉefestro / 13. tempo-daŭro / 14. rilata al sia propra vivo / 15. beŝt'ila / 16. stil'formo de la lasta jar'cento / 17. plen'potenca.

Legendo¹ pri unu-korn'ulo

O ni rakontas, ke antaŭ mil jaroj en la arbaroj de Ĉinio kaj Hindio vivis besto, tre simila al ĉevalo. Ĝi ne sub-premis la herbarojn kaj ne estis danĝera por la homoj. Ĝi povis havi diversajn kolorojn: bluan, ruĝan, flavan aŭ nigran, kaj havis kornon en la mezo de la frunto. La korno povis havi tri kolorojn: ruĝan, blankan kaj nigran.


Se ĝi haltis ĉe fonto por trinki akvon kaj, se per sia korno ĝi tuŝis la akvon, ĝi fariĝis dolĉa. Kiam ĝi aperis en vilaĝo, oni antaŭ-sciis, ke baldaŭ nask'iĝos saĝa guberni'estro². Kaj tuj ek-estis damaĝo³, kiam iu vundis ĝin aŭ trovis ĝin mort'inta.

Multaj atestas, ke ĝia korno havis magian⁴ forton, tiom, ke se iu trinkis venenon el ĝia korno, nenio okazis al la trinkinto. Oni ankaŭ rakontas, ke por kapti ĝin necesis bela fraŭlino, kiu allogis ĝin kaj antaŭ kiu ĝi falis kaj kapitulacis⁵, alie ĝi ne doniĝis, neniu ĝin povis kapti. Ĝi estis tre inteligenta⁶ kaj rapida. Tiu bela legendo inspiris⁷ art'istojn de mal-samaj epokoj. Pri tio atestas bildoj, poemoj, kanzonoj⁸, filmoj...

Estus tre bone, se tiu ĉi legendo fariĝus vera!

Kion vi farus, se
vi trovus unukorn-
ulon? Ĉu vi ko-
nas kanzonon,
filmon, ktp. en kiu
aperas tiu besto?
Ĉu vi konas alian
legendon pri
unukornulo?
Rakontu ĝin.

Traduk'ita de José
de J. Campos
Pacheco, Kubo



1. rakonto pri malnova okaz'int'aĵo fabel'eca / 2. gubernio: granda parto de lando / 3. mal-profitito / 4. super-naturan, mir'indan / 5. sin trans-doni sen kontraŭ-staro / 6. saĝa kaj vigla-pensa / 7. est'iĝis pensojn kaj sentojn / 8. poemojn kant'atajn.

Harry Potter

TRADICIA KAJ NE-TRADICIA FENOMENO¹

Milionoj legis, milionoj spektis: ĉie Harry Potter [Hari Pote], Harry Potter, Harry Potter. Tiuj, kiuj ne aŭdis pri Harry Potter – kiu ĉe sia sorĉ'isto-lernejo² Hogwarts [Hogŭets] batalas kontraŭ mallumo kaj malbono (samtempe ne-imag'eble riĉ'ig'ante sian kre'int'inon *J.K.Rowling* [Reŭleng]) – kred'eble feris sur Marso kaj mistrafis la plej novan libran, filman furor'fenomenon³: sensacion⁴ de la jaro 2001.

Tamen, ĉu Harry Potter vere prezentas ion novan? Jes kaj ne. Ekzistas longa tradicio en la brita ge-knaba literaturo pri lernejoj, kiaj Hogwarts. Bone, ne precize (ne pri sorĉ'isto-lernejoj), sed pri t.n.⁵ intern'ul'ejoj: t.e.⁶ lernejoj for de la forno kaj familio, kie geknaboj ne nur lernas sed ankaŭ loĝas (reven'ante hejmen nur por longaj ferioj). Al generacioj⁷ de junaj britoj (aparte al la pli-multo, kiuj neniam spertis tian vivon) plaĉis kaj plaĉas aventuroj kaj misteroj⁸ pri internuloj. Kaj al tiu ĉi "internuleja" tradicio (ĉu en aliaj lingvoj ekzist'anta?) tre nature al-kroĉ'iĝas la verk'aro de J.K. Rowling.


Malgraŭ tradicia fono⁹, malgraŭ multaj tuj re-kon'ebraj trajtoj de tipe brita internula lernejo (ekzemple, divido de la



lernej'anoj en t.n. 'domoj', t.e. grupoj, kiuj intelekt'e¹⁰ kaj sporte konkuras), la etoso de la libro *Harry Potter kaj la Ŝtono de Filozofo* neniel tradicias. Mem-evidente: temas, ja, ne pri kutima, sed pri sorĉ'ista lernejo. Ĝin oni atingas, ekzemple, per mal-nova vagon'aro, tir'ata de vapor'lokomotivo, kiu magie for-lasas la realan mondon de granda, londona ĉef'staci'domo de kajo naŭ kaj tri kvaronoj. Plue: la stud'plano de la lernejo Hogwarts ne en-havas matematikon, geografion, fremdajn lingvojn (hura!), sed fakojn multe pli allogajn (kaj eĉ utilajn): pri-sorĉ'adon, defend'adon kontraŭ nigraj artoj, flug'adon, dozologion¹¹, k.t.p. Kaj, anstataŭ rugbeo, futbalo – aŭ teniso¹², hogwarts-anoj dediĉas sin al unu el la plej kuriozaj sportoj iam ajn el-pens'itaj: Quiditch [kŭideĉ]. Ne eblas ĉi tie pri-skribi la ludon (necesas flug'antaj bala'iloj).

Kaj la libro kaj la filmo sorĉ'is – por tiel diri – ne nur gejun'ulojn, sed ankaŭ gepatrojn kaj geavojn. Ĝi tiel sorĉ'is, ke

potter'ajoj jam en-iris la anglan lingvon: antaŭ krist'nasko mi legis en mia urba ĵurnalo ĉeftitolon: "Ne aĉetu Hedwiga-n!" Hedwiga [Hedŭiga] estas la nomo de la strigo¹³ de Harry Potter: strigoj portas leterojn de kaj al hogwarts-anoj (evidente funkcias ĉe la lernejo nur aer'poŝto). Ŝajnas, ke infanoj petis kristnask'donace strigojn – pro tio la ĵurnala averto.



Sorĉas ankaŭ la nomoj en la Potter-libroj (sen-dube diable¹⁴ malfacile traduk'eblaj). La konata angla verk'isto de la 19-a jar'cento, *Charles Dickens* [Ĉalz

Dekens], inventis¹⁵ plej trafajn, plej el-vok'ivajn nomojn; ankaŭ J.K.Rowling, ŝajne, sekvas la spurojn¹⁶ de Dickens. Tre plaĉas, ekzemple, la nomo de la mal-bon'ula 'domo' ĉe la lernejo Hogwarts: Slytherin [Sli-teren]. La sono sugestas al angla-lingv'anoj la verbon 'slither', t.e. stumble¹⁷ gliti. La nomoj prezentas apenaŭ super'eblan defion¹⁸ por la traduk'istoj.

Kaj, jes, la libroj estas traduk'itaj en aliajn lingvojn (ankaŭ ne, laŭ mia scio, en Esperanton). Sed jen strang'ajo. La titolo de la unua, film'ita libro (jam aperis en-tute kvar libroj; J.K.Rowling laŭ-dire prilaboras la kvinan) jenas: *Harry Potter kaj la Ŝtono de la Filozofo*. Tamen, kial en la germana oni parolas pri *La Ŝtono de la Saĝ'ulo*? Kaj – eĉ pli ne-kompreneble – kial en la usona (kiel mi lasta-tempe legis) oni rezignis pri la angla titolo kaj anstataŭe parolas pri *La Ŝtono de la Magiisto*? Jen plia mistero sorĉiste solv'enda de Harry Potter kaj la kun-ul'aro ĉe lernejo Hogwarts...

Paul GUBBINS, Britio

1. afero, okaz'ajo / 2. sorĉi: ali'formi per super-natura forto / 3. furoro: sukces'ego / 4. viglan inters'egon / 5. tiel nom'ataj / 6. tio estas / 7. sam'aĝ'ul'aro / 8. sekreto-plenaj, strangaj okazaĵoj / 9. viv'medio komuna por certa hom'grupo / 10. per siaj kapabloj pensi / 11. studoj pri tio, kiom da kurac'ilo necesas por re-san'igi iun / 12. diversaj pilk'ludoj / 13. speco de birdo (vidu la bildon) / 14. diablo: loĝ'anto de mal-ĉiellando / 15. el-pensis / 16. pied'signojn / 17. fal'ete / 18. tre malfacile solv'ebla tasko.

PROVERBOJ

Saĝa estas la hundo post ricevo de l' bato.

Rajdi sur ĉevalo oni ne lernas sen falo.

Scienco havas semon enuan, sed frukton bon'gustan.

Anja
Karkiainen



Vi

pro
me
sis



Paĉjo, via hejmen-veno
estis kaŭzo por ĉagreno
pro forgeso de promeso.
Fi al vi!

Min instrui najli¹, segi²
aŭ kun-ludi, libron legi
vi promesis, sed forgesis.
Fi al vi!

1. najlo: fiks'ilo; pinta metala stang'eto; najli: fiksi per najlo, en-bati najlon / 2. ligno-tranĉi / 3. diras kun plena cert'eco / 4. paŭti: pint'igi la lipojn pro mal-bon'humoro aŭ mal-kontento / 5. kun intenca kontraŭ-staro.

Vi asertas³, ke mi gravas,
sed por mi ne tempon havas.
Vi promesas, sed forgesas.
Fi al vi!

Vi preferas televidi!
Mi al vi ne povas fidi!
Vi promesas, sed forgesas.
Fi al vi!

“Morgaŭ.” “Poste.” “Ali'foje.”
Aŭdi devas mi mal-ĝoje.
Vi promesas, sed forgesas.
Fi al vi!

Tial mi mal-gajas paŭte⁴
kaj spit'eme⁵ plendas laŭte:
“Vi promesis, sed forgesis!
Fi al vi!”

Tuj mi tamen ek-silentas
kaj pardonas, se vi pentas.
Nun sen-pune ludu kune
vi kaj mi!

Muziko: Vesa Pölkki

Paĉ - jo, vi - a hej-men-ve-no es-tis kaŭ-zo por ĉag-re-no
pro for-ge-so de pro-me-so. Fi al vi!



Bonvenon al "La Unua Etaĝo" por 2002. Kion freŝan fari por nia por-et'ula rubriko? Nu, kial ne trans-doni ĝin al du eks-etuloj? Ili scias pli bone ol mi, kion ŝatas legi etuloj. Ili mem legas tre multe. Kaj nun ili verkas. Karina prezentos rubrikon pri bestoj, Hajnal pri ŝercoj el stranga planedo.

SOLVI ENIGMON — RICEVI TREZORON!



Iam estis reĝo kun trezoro. Li alvokis multajn homojn kaj diris: "Mi diros al vi la komencon de rakonto kaj taskon. La tasko estas el-trovi sekretan frazon. Tiu frazo havas kvin vortojn. Kiu diros la frazon, ricevos mian trezoron. Jen la rakonto-komenco!" Kaj li ek-rakontis:

Nia rakonto okazas en reĝa kastelo. La reĝo havas du fil'inojn.

"Ĉu ne estas bravaj princoj por miaj filinoj?" li demandis. "Ili ambaŭ estu tre kuraĝaj kaj sen-timaj." Star'igis princo Johano la Bonkora kaj Edvardo la Sen-denta. La unua diris: "Mi pruvos, ke mi estas ne nur bonkora, sed ankaŭ kuraĝa kaj sentima." Jen la rakonto-eko. Nun, diru al mi la kvin-vortan sekretan frazon.

Stariĝis Frederiko kaj diris: "Granda stult'ulo estas nia reĝo."

"Mal'ĝusta!" diris la reĝo. "For-portu lin al malliber'ejo!"

Stariĝis Tereza kaj diris: "Ter'pomoj kantas en merkreda cirko!"

"Mal'ĝusta!" diris la reĝo. "Forportu ŝin al frenez'ul'ejo."

Stariĝis Ronaldo kaj diris: "Ŝlos'ilo mal-fermos la trezor'ejon!"

"Mal'ĝusta!" diris la reĝo. "Forportu lin al lernejo, kie li lernu kalkuli ĝis kvin!"

Stariĝis Rozalinda kaj diris: "Nia reĝo estas tre bonkora."

"Ĝusta!" kriis la reĝo ĝoje. "Vi diris la ĝustan frazon!"

Kaj ŝi ricevis la trezoron.

(Daŭrigo sur la sekva paĝo)



ŜERCO

SERÇO

de Hajnal
MacGill



Nia Ŝerco-serço portas nin al la planedo Pluturno. En Pluturno estas kvar landoj: Stulturo, Brillando, Budabesto, Avario.

En Stulturo troviĝas stult'uloj, en Brillando estas homoj, en Budabesto vivas bestoj kaj en Avario loĝas tre ŝpar'emaj homoj. Pri ili vi aŭdos ŝercojn.

La kanto-grupo

Homo volas formi kanto-grupon. Kelkaj stultuloj al-venas.


La homo demandas:

“Kiu tre ŝatas muzikon?”

Kelkaj stultuloj paŝas antaŭen. Unu demandas:

“Kion kanti?”

“Nenion. Vi devas nur supren-porti la pianon al la kvina etaĝo.”



Telefono

Du stultuloj promenas sur la strato. Unu trovas dek-stulturan mon'eron.

“Petro, ĉu ni konservu ĝin?” demandas unu.

“Kompreneble, konservu ĝin, vi povos telefoni per ĝi.”

La alia prenas la moneron kaj levas ĝin al la buŝo, kri'ante:

“Ha-lo! Tomaso?”

Kaj nun taskoj por vi:

1. Kiel Rozalinda sci'povis diri la ĝustan frazon? (Respondo en la sekva numero de “La Unua Etaĝo”)
2. Finu la rakonton de la reĝo. Rakontu, kion faris Johano por pruvigian kuraĝon kaj edzin'igi la unuan princ'inon. Kion faris Edvardo por rajti edzinigi la duan princinon?

Sendu al ni vian respondon kaj rakonton. Ni premios la plej bonajn!

Karina
MacGill



ĈIO INTERESA PRI ELEFANTOJ

Elefantoj estas la plej grandaj sur-teraj bestoj. Ili povas esti 7 tunojn¹ pezaj kaj 3 metrojn altaj.

Kiam ili trovas sek'iĝ'antan lagon, kelkaj skrapas kaj fosas ĝis ili trovas akvon. Aliaj helpas ĝis estas sufiĉa akvo por ĉiuj. Aliaj grupoj ne rajtas tie trinki.

Ĝiaj okuloj estas malfortaj... kaj aŭd'ado estas bon-egaj.
sed ĝiaj flar'sento...

Hindiaj elefantoj ne estas tiom grandaj, kiom la afrikaj. Iliaj oreloj ne estas tiom grandaj kaj nur la vir'elefanto havas dent'egon.

La elefantoj plej ofte havas unu idon. Je naskiĝo ĝi pezas averaĝe² 100 kilogramojn. Ĉirkaŭ du jarojn ĝi suĉas la lakton de la patrino.

Iliajn grupojn gvidas la plej aĝa ino.

La rostro (naz'ego) estas utila.

Se estas varme, ĝi povas ŝpruci akvon sur sin per ĝi. Ĝi povas porti pezajn objektojn kiel arbo-trunkojn.

1. mil kilogramojn / 2. mez'nombro; ĉirkaŭ.

KVIZO KONKURSO POR VI^{en}

Ni dandas kaj elkore gratulas al ĉiuj gajri'ntoj (vidu ilin sube!) kaj konkurs'intoj. Nun, per la kvizo sur la apuda paĝo, komenc'iĝas nova konkurso-jaro.

JEN LA REGUL'ARO DE NIA KVIZO-KONKURSO

- Oni povas partopreni en ĝi individue aŭ grupe (sub la nomo de iu grup'ano aŭ klas'ano kun post-signoj *gr* respektive *IK* [Interkultura Klaso]).
- Ekzistas tri aĝo-kategorioj: **1a** – ĝis 12- / **2a** – 13-17- / **3a** – pli ol 17-jar'uloj.
- La solvojn sendu rete aŭ papere al la adreso, don'ta sube de la aktuala kvizo.
- La ĝustaj solvoj kaj la listo de la konkurs'intoj ĉiam aperas en la sekva numero de nia revuo (nur la pinto!). La kompleta listo estas leg'ebla en nia hejm'paĝo: www.banyal-kkt.sullnet.hu/esperanto
- La unuaj en ĉiu kategorio ricevas jar'abono al *Juna Amiko* por la jaro 2003.
- Pro evidenta ne-mem-stara solvo la jurio de-prenas la duoblon de la akir'eblaj poentoj de la task'eto.

FINA REZULTO

DE LA KVIZO-KONKURSO EN 2001

1-a kategorio

1. *Agnesa Gulyás (gr), HU:* 84,0 p.
2. *Elina Tauriainen, FI:* 74,0 p.

2-a kategorio

1. *Samanta Ĉajic, HR:* 113,0 p.
2. *Medvedgrad (IK), HR:* 112,5 p.
3. *Marina Milkovic, HR:* 112,0 p.
4. *Dragutin Domjanic (IK) HR:* 110,5 p.

3-a kategorio

1. *Erkko Mäki, FI:* 117,0 p.
2. *Lenče Efremova, MK:* 115,5 p.
3. *Maria Molnár, HU:* 115,5 p.
4. *Pavol Petrik, SK:* 109,5 p.
5. *Ekaterina Popovicu, RO:* 108,0 p.

Kompleta listo en nia hejm'paĝo!

*La plej lertaj solv'intoj
de la decembra numero
(Redaktis kaj korektis:
Raita Pyhälä, Finnlando)*

1-a kategorio:

*Agnesa Gulyás (gr), HU: 30 p.
Elina Tauriainen, FI: 28 p.*

2-a kategorio:

*Medvegrad (IK), HR: 29 p.
Marina Milkovic, HR: 28 p.
Zorica Ranagajec, HR: 28 p.
Samanta Ĉajic, HR: 27 p.
Svijetlana Akik, HR: 27 p.*

3-a kategorio:

*Pavol Petrik, SK: 30 p.
Maria Molnár, HU: 30 p.
Erkko Mäki, FI: 30 p.
Petro Tihanyi, HU: 30 p.
Lenče Efremova, MK: 30 p.*

- | | | |
|----|--|-------------|
| 1 | Kiam kaj kie aperis n-ro 1 de "Juna Amiko"? | (2 poentoj) |
| 2 | En kiuj lingvoj estis publik'ig'ita la Unua Libro de Esperanto en la jaro 1887? (<i>Serbio</i>) | (4 poentoj) |
| 3 | Menciu du aferojn, kiuj kun-igas la tri ĉefurbojn: Vieno, Pekino, Varsovio. (<i>Finnlando</i>) | (3 poentoj) |
| 4 | Kial ĝirafa neniam estas sola (!)? (<i>Germanio</i>) | (2 poentoj) |
| 5 | Ord'aranĝu la literojn por ricevi senco-havajn Esperantajn vortojn: <i>tagoze, torkevo, subperkoli</i> . (<i>Hungario</i>) | (3 poentoj) |
| 6 | En kiu lando aperis la unua E-poŝtmarko? (<i>Svislando</i>) | (2 poentoj) |
| 7 | Faru el la klišo <i>sen...ulo</i> almenaŭ ok vortojn inter-met'ante diversajn radikojn. (<i>Ĉeĥio</i>) | (4 poentoj) |
| 8 | Kiel nom'igas la ago (!) de lupoj? (<i>Ukrainio</i>) | (2 poentoj) |
| 9 | Kiu sono (!) iras per-piede? (<i>Norvegio</i>) | (2 poentoj) |
| 10 | <i>Ne helpas spegulo al ...</i> . Komplet'igu la proverbon! (<i>Francio</i>) | (3 poentoj) |
| 11 | Kiom da Esperantaj poemoj verkis Zamenhof? (<i>Makedonio</i>) | (3 poentoj) |


La solvojn sendu al: *Geza Kurucz, Hiteľ u. 10. fszt. 16, HU-6000 Kecskemét, Hungario*
Ret'adreso: *sull267@szeged.sulinet.hu*

Solvoj de la lasta numero (n-ro 4) de 2001

1. -*ujo*: manĝujo, kafujo, bakujo; -*ej*: manĝejo, kafejo, bakejo*
2. kolibro: *muŝbirdo*, kaverno: *groto*, koketa: *flirtema / frivola*
3. Kiu; Kio; Kion; Kioma
4. *polvero, polverigi, polvotuko, polvonubo, polvoplana, senpolvigi, polvo-kovrita**
5. ĉemizo, ĉapo, ĝinso / ĝinzo, ŝalo, ŝuoj, zono, zorio*
6. nomon, naskiĝdaton, naskiĝlokon, naciecon
7. Ĉar -*ul* apartenas al la radiko. Ĝi ne estas sufikso en la donitaj vortoj.
8. Li *eklaboris*. Ni renkontiĝadis. Mi *misauĝdis*.
9. iri, kuri, marŝi, promeni, troti, danci, galopi, sin treni, piedi*
10. CA: Kanado, CH: Svislando, CU: Kubo, CN: Ĉinio

* ekzistas pluraj ĝustaj solvoj.

Ringa enigmo



Skribu la vortojn laŭ la sign'ita direkto!

Dieter BERNDT, Germanio

- | | |
|-----------------------------|---------------------------------|
| 1. Nigra trink'ajo; | 6. Parenco; |
| 2. Grasa flu'ajo; | 7. Mal-plen'ajo; |
| 3. lama; | 8. Litero de la greka alfabeto; |
| 4. Plej mal-alta vira voĉo; | 9. Danc'amuzo; |
| 5. Konifera arbo; | 10. Insekto (radiko). |

50 TEND'ARA JUBILEO

Antaŭ 50 jaroj vivis en la moravia² urbo *Třebíč* grupo de knaboj, kiuj lernis Esperanton. Dum la someraj ferioj, ili ŝatis tra-vivi kelkan tempon en tendoj ie, en la naturo, ĉe akvo, en arbaro. Estis la jaro 1952, kiam venis al

ili la ideo kun-igi la du interesojn: tend'umi en la naturo kaj samtempe lerni Esperanton. Post sukceso de la unua tia tendaro, ili decidis aranĝi similan ankaŭ dum la ven'ontaj jaroj. Kaj ĉar ili ne volis resti solaj inter si, ili invi-

tis ge-jun'uloj el aliaj lokoj. Kaj ili venis mult'nombre. En la jaro 1955, la tendaro okazis jam en tri etapoj³ po du semajnoj. En ĉiu etapo partoprenis proksimume 30 gejunuloj. Tiel est'iĝis la **Somera Esperanto-Tendaro (SET)**. La tendaro kelk'foje ŝanĝis sian lokon, ĝis, fine, en la jaro 1958 oni trovis taŭgan lokon ĉe la vilaĝo Lančov, kie ĝi troviĝas ĝis hodiaŭ.

En la komencaj jaroj venis nur mal-multaj esperantistoj el aliaj landoj. Sed ankaŭ tio ŝanĝ'iĝis. Venis, poste, tutaj grupoj, ekzemple, el Pollando kaj Bulgario. Dum la jaroj, en la tendaro partoprenis esperantistoj el ĉiuj eŭropaj landoj, kaj ankaŭ el multaj ekster-eŭropaj. La kresk'anta intereso kun-portis ankaŭ zorgojn. Estis necese pli-grand'igi la tend-


aron. Sur la loko de tendoj aperis kabanjoj⁴. Oni konstruis kuir-ejon, manĝ'ejon kaj lav'ejon. En la sep-kaj ok-dekaj jaroj en ĉiu etapo partoprenis pli ol cent tendar'anoj. Multaj re-venis ĉiujare. Estiĝis granda familio de tendaranoj.

En la tendaro okazis diversgradaj kursoj, de *A* (por komencantoj) ĝis *D* (por kurs'gvidantoj). Por la tendaro estis verk'itaj specialaj lerno-libroj, vort'aroj kaj lego-libroj. Post kelkaj jaroj iuj el la tendaranoj revenis kiel kurs'gvidantoj.

La posttag'mezoj servas por sin-amuzo. Oni povas viziti interesajn lokojn en la proksima ĉirkaŭ-aĵo. Okazas tuttaga aŭtobusa ekskurso. La apuda lago invitas al sin-ban'ado aŭ boatvetur'ado⁵. La vesperojn oni

povas tra-vivi kant'ante aŭ babil'ante ĉe tendar'fajro.

Bedaŭr'inde en la 90-aj jaroj en multaj eks-komunismaj landoj mal-pliiĝis la intereso pri Esperanto, sekve mal-kreskis la intereso pri



La tendaro en la 50-aj jaroj.

la tendaro en Lančov. Por garanti⁶ la daŭran ekzist'adon de la tendaro, krom Esperanton oni nun instruas ankaŭ aliajn lingvojn, ĉefe la anglan kaj germanan. Kvankam ĉiu-jare venas multaj gejunuloj al Lančov, la grupo de tiuj, kiuj interes'iĝas pri Esperanto estas nur malgranda, tamen ni firme esperas, ke en la est'ont'eco, esperantistoj denove pli kaj pli interesiĝos pri

la tendaro kaj ke, dum la somero, tra la tendaro denove sonos Esperantaj paroloj kaj kantoj, same kiel estis dum la pli fruaj jaroj.

Dieter BERNDT, Germanio

Se vi havas intereson ek-scii pli pri la tendaro, skribu al:
Esperanto, CZ-674 01 Třebíč, Ĉeĥio.

1. rond'cifera dat're-veno / 2. Moravio: orienta regiono de Ĉeĥio / 3. etapo: tempo-daŭro / 4. simpla dom'eto / 5. boato: simpla akvo-vetur'ilo / 6. cert'igi ion.

Fotoj el la 35-a Internacia Infana Kongreseto

(Vidu ilin sur paĝo 27)

1. Ni akceptis multajn gastojn. Jen *Krizantemo* el Japanio, kiu kunportis kimonojn kaj *Iwona* tra-iris la komplikajn vest'igan proceduron.
2. Tiu ĉi foto montras la rigardantojn. *Tina* el Kroatio (plej mal-dekstre) jam portas kimonojn. La aliaj estas (dekstren-ire) *Karlijn* el Belgio, *Kanna* el Hungario, *Mici* el Germanio, *Klara* el Nederlando, *Julla* el Japanio, *Maya* el Israelo kaj *Marjholen* el Francio. Sep knabinoj el sep landoj!
3. Alia gasto el Zagreba muzeo gvidis labor'grupon pri pret'igo de bildoj el flor'petaloj, kiujn la infanoj mem kolektis. Vizitis nin, krome, la nove elekt'ita prezid'anto de UEA, *Renato Corsetti* (maldekstre) kaj la edz'ino, verk'ist'ino *Anna Lowenstein* (apude), kies infanoj partoprenis kelkajn pli fruajn infanajn kongresetojn.
4. Dum la varmaj posttag'mezoj, oni ĝuis frenezan olimpiadon, trezor-konkurson kaj la kapton de kruel'ega drako (vidu la foton).

La 36-a IJK okazos en Brazilo, komence de aŭgusto (3-10), paralele kun la Universala Kongreso, en ekologia rezerv'ejo, ene de Fortaleza, la kongres'urbo.

Ni dissendis informilon kaj al-iĝ'ilon kun la antaŭa numero de Juna Amiko. Se vi ne ricevis ĝin aŭ se vi bezonas pliajn ekzemplerojn, petu de la komisiito, Stefan MacGill (adreso sur paĝo 26).



Ha-lo!



Stanko: Ha-lo! Bonan tagon!

Zoran, ĉu estas vi?

Zoran: Jes, mi estas! Kiu telefonas?

St: Mi ĝojas, ke vi min rekonas!

Z: Mi ne bone aŭdas! Mi demandas pri via nomo!

St: Jes, estas malbona sono! Ver'ŝajne ia difekto!

Z: Sed kun kiu mi parolas?

St: Ho, nun, fine, mi bone aŭdas. Ĉi tie via amiko Stanko!

Z: Mi ĝojas vin aŭdi!

St: Kial min laŭdi? Ĉu pro mia kuraĝo?

Z: Mi eĉ ne sciis pri via vojaĝo! Kiam vi re-venis?

St: Mi iom-ete promenis kaj mi deziris saluti vin kaj demandi pri via sano!

Z: Ĉu vi ek-sciis pri mia mano? Feliĉe, ĝi re-san'igis kaj mi jam laboras en nia ĝardeno.

St: Kion vi faras en la haveno?

Z: Jes, jam en mateno mi flegas la plantojn.

St: Mi ne sciis, ke vi havas elefantojn¹.

Z: Mi ne havas diantojn², sed rozojn, kiuj nun floras.

St: Kial vi ploras?


Z: Doloras min la fingro, dornon³ mi tuŝis!

St: Kion vi puŝis?

Z: Denove mi ne aŭdas!

St: Mi demandis, kion vi puŝis!

Z: Aha, nun mi komprenas.



Mi kuŝis sub arbo. Estis bela suna tago.

St: Kiu lago? Ĉu tie estas ebleco por bano?

Z: Jes, jes. Tio estas bona por sano!

St: Kara amiko, mi ĝojas, ke vi telefonis, sed mi devas ĉes'igi la parol'adon, ĉar venas la poŝt'isto. Temas pri mia poŝt'aĵo.

Z: Mi komprenas. Vi devas zorgi pri via sano. Kaj ankaŭ estas grava post'aĵo.

St: Telefonu denove, Goran. Salutu la famili'anojn!

Z: Jen mi ek-sciis ĉiujn nov-aĵojn pri vi. Venu al mi! Salutu la edzinon, Branko!

Verkis: *Nedeljka Subotić*,
Jugoslavio

1. grand'egajn mam'bestojn kun naz'ego (=rostro) / 2. dianto: speco de floro plej ofte ruĝa aŭ blanka / 3. pik'ilon de kresk'aĵo.



Kara "Juna Amiko",

via pli aĝa frato – revuo **KONTAKTO** – kore gratulas vin okaze de via bela jubileo. Restu same bela, interesa, amuza kaj ĉiam juna.

Pli-dik'iĝon kaj dis-floron deziras via

KONTAKTO

Saluton! Ni loĝas sur la paĝoj de la revuo KONTAKTO kaj ege ŝatas legi diversajn revuojn. Pli ol ĉio plaĉas al ni KONTAKTO kaj JUNA AMIKO.

Juna amiko

Internacia Esperanto-revuo de ILEI por lernejanaj kaj komencantoj

29-a jaro, n-ro 1 (100), 2002

Aperas 4 fojojn jare

Redaktoro: **Géza Kurucz** (Hítel u.10.fsz.16, HU-6000 Kecskemét, Hungario)

Retadreso: suli267@szeged.sulinet.hu

Vicedaktoro: **StefanMacGill** (retadreso: stefan.macgill@galamb.net)

Varba direktanto: **Zoran Ćirić**, Branka Miljkovića 14, YU-18000 Niš, Jugoslavio

Administranto: **Sándor Hideg**, Retadreso: juna.amiko.adm@posta.net

Abona adreso: Juna Amiko, Pf. 193, H-1368 Budapest, Hungario

Eldonanto: ILEI, Stenbockensgata 102, SE-136 62 Haninge, Svedio

Lingva revizianto: **André Albault** (Francio)

Kunlaborantoj: *s-ino Raita Pyhälä*, Anja Karkkainen (Finnlando), Baldur Ragnarsson (Islando), Tatjana Auderskaja (Ukrainio), s-ino Jennifer Bishop (Aŭstralio), Zoran Ćirić (Jugoslavio), s-ino Saranath (Hindio), Gennadij Basov (Rusio), Bardhyl Selimi Mežini (Albanio), Tili Dahienburg, Dieter Berndt (Germanio), Pekim Tenorio Vaz, Evandro de Freitas (Brazilo), Elizabeta Rajtmár, Zoltán Kurucz (Hungario), Marija Belošević (Kroatio), Michel Nkwirikiye (Tanzanio), Eugenia-Ecaterina Popoviciu (Rumanio), Mensah B.Attiogbe-Agbemadon (Togolando), José J.Campos Pacheco (Kubo).

Grafikistoj: **Irina Nagy** (Rumanio), **Monika Molnár** (Hungario), **Pavel Rak** (Ĉeĥio)

Komputila kolora tekniko: **János Bakk** (Hungario)

Farita en Presejo Saluton

Chinoín u.20, H-1045 BUDAPEST, Hungario

ISSN 0230 1318



MOMENTOJ

La 36-a INTERNACIA
INFANA

KONGRESETO

okazos en Fortalezo,
Brazilo (3-10.08.02)
paralele kun UK
(Informaj sur paĝo 24)

el la 35a

INFANA

KONGRESETO

en Zagrebo

(Vidu la paĝon 24)



PASKO



1/02